

3



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA
ESPERANTISTA ASOCIO

MARTO 1963

E N H A V O

	Paĝo
* * * Renkonte al la 48-a	1
D-ro Boris Neĥkov. Pensoj pri la 48-a UK en Sofio	2
8-a Infana Esperanto—Kongreseto	3
Atanas D. Atanasov — Ada. Dekkvara leciono	4
BELETRO KAJ POEZIO	6
Lazarina Kânčeva. Novjaro	7
Violin Oljanov. Rememoro pri Mois Levi	8
MEDICINISTA SEKCIO	9
TRIBUNO DE LA LEGANTO	13
Petko Arnaudov. Ora Spiko	13
* * * Hugo Steiner 85 jaraĝa	14
TRA LA GAZETARO	16

*Abonkotizo : jara — 1,4 levoj, duonjara — 0,7 lv. Por eksterlando — 2lv
2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio,
Pollando kaj Rumanio — 1,6 lv.*

*Reklamtarifo : 0,15 levoj por cm²; korespondanconcoj : 5 stotinkoj por ĉiu
vorto. Eksterlandaj adresoj publikigataj senpage. Ekstera kovrilpaĝo — 60 lv.*

LANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Inĝ. Cefo Fico, 44 Rruga Stafa, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, via A. Boito 6, Padova

KOREO: Korea Esp. Asocio. Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23 Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, București 5

SOVETUNIO: Ivan Palkin, Mitnaja ul. 52/54 kv. 19, Moskva, B—162

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109—a.

RENKONTE AL LA 48-A

Neniam en la historio de nia enlanda movado staris antaŭ BEA tiom da gravaj taskoj, kiel dum la nuna jaro. Por konvinkiĝi pri tio, necesas direkti eĉ supran rigardon al la rezolucio de nia 35-a kongreso. Tie oni povas legi, ke honore al la 48-a kongreso de UEA la nombro de la membroj de la asocio pliiĝu de kvin mil al ses mil. Cifero impona, sed tute reala ĉar en nia lando la neorganizitaj geesperantistoj multoble superas la planitajn pliiĝon.

En la sama dokumento oni povas legi ankoraŭ, ke la kongreso postulas de la Centra Komitato fortikigi la fakon „Internacia korespondado“. Tio signifas, ke ni uzu Esperanton ne nur por interŝanĝo de poŝtmarkoj kaj ilustritaj kartoj, sed ĉefe por detrui la murojn de malamo kaj reciproka suspekto, kiujn starigis dum jarcentoj la regantaj klasoj kaj nun starigas la trumpetistoj de la malvarma milito.

La 35-a en Burgas decidis ankaŭ instigi al plialtigo de la lingva nivelo. Tion la societoj atingos malfermantaj kursoj por progresintoj kaj praktikante la lingvon en niaj ĉiusemajnaj kunvenoj. La sezono tre favoras la plenumon de tiu ĉi tasko kaj ni devas fari ĉion eblan por ĝin realigi. Tiamaniere miloj da fremdlandaj geesperantistoj, kiuj dum aŭgusto vizitis nian landon, renkontos flue parolantajn verdstelanojn, sed ne balbutantojn.

La kongreso decidis unuanime plibonigi la ideologian kaj edukan laboron inter la membroj de la asocio, legante konvenajn referaĵojn kaj artikolojn. Al tiu ĉi lasta demando estis dediĉita la decembra plenkunsido de Centra Komitato de BEA.

Tiaj kaj similaj estas la taskoj, starantaj antaŭ nia asocio. Ilin ni solvos paŝon post paŝo, laŭplane, sed ĉefe kolektive, per la fortoj de la tuta organizita esperantistaro. Neniu esperantisto imagu, ke la aferoj marŝos sen lia partopreno. Ni rememoru la saĝajn vortojn de Zamenhof: „Eĉ guto malgranda, konstante frapante, traboras la monton granitan“. Aktiva esperantisto neniam restas senokupa.

En nia poresperanta kaj peresperanta laboro nin devas entuziasmigi la antaŭstaranta 48-a internacia kongreso. Kiom da malnovaj pioniroj revis vidi en nia lando tutmondan esperanto-kongreson! Ili forpasis, ne havante tian feliĉon. Nun, dank'al la semoj, kiujn ili jetis, Bulgara Esperantista Asocio estiĝis forta kaj influa organizaĵo, kiu povas inviti internacian kongreson. La nuntempa esperantista generacio devas streĉi siajn fortojn por brile realigi la revon de la Esperanto-pioniroj.

Renkonte al la 48-a, ni iru laŭ la vojo, montrita al ni de la 35-a kongreso en Burgas!



SOFIO 3-10 VIII 1963

PENSOJ

PRI LA 48-a UK

EN SOFIO

La nunan jaron 1963 ni, bulgaraj esperantistoj, malnovaj kaj novaj, travivos kiel la plej signifoplenan por la enlanda Esperanto-movado, ĉar Universala Esperanto-Kongreso ne estas afero ĉiutaga, eĉ ne ĉiujara, sed io escepta kaj grandioza, ne ofte ripetebla.

En la jaro 1923 mi vizitis la XV Universalan Kongreson en Nurnbergo, Germanio, kaj mi ofte kun admiro rememoras kiel grandioze kaj lerte estis organizita tiu plej granda kaj multenombra kongreso de ĉ. 5.000 samideanoj el 48 landoj de la tuta mondo. Kiel grava rememoro de tiu kongreso restis la lukto pri la venontokazigo de universala kongreso, kiam la opinioj estis dividitaj, ĉu ĝi okazu en Bulgario, aŭ en Hungario, aŭ en Aŭstrio. Multaj parolintoj defendis la ideon, ke nur okcidenteŭropaj ĉefurboj povus akceptitiel multnombrajn kongresojn, ĉar nur ili havas decajn hotelojn kaj ĉian alian kongresan komfortecon.

Tiam, inter la aliaj porbulgaraj parolintoj, pollandano agitis tiamaniere: „Ho, ni invitas vin al Bulgario, al tiu ĉarma lando de l'rozoj, kie mi preferus loĝi plenaere, ĉirkaŭita de l'agrabla aromo, de rozodoro!“ Rezulte, oni lasis solvi la aferon la estonta Komitato de UEA.

Kaj nun, post plenaj 40-jaroj efektiviĝos jam la okazigo de UK en nia lando. Sed tiu estas la unua flanko de la dezirinda okazintaĵo. La alia flanko estas pli grava kaj pli respondeplena. Tio estas la aranĝado mem de l'kongreso. Ĝi devas okazi tiamaniere, ke ĝi bone kontentigu niajn gastojn el la multnombraj mondpartoj samkiel niajn samlandanojn.

La nova jaro 1963 jam ruliĝis kaj la laboro por la kongreso senhalte pliintensigos. Ĉiuj bulgaraj esperantistoj devas kontribui per sia partopreno por la bona sukceso de l'kongreso. El la eblaj preparoj pri ĝi mi antaŭfiksos la jenajn. Unue, la ejo de BEA devas esti reprezenta, ĉar multe da kongresanoj direktiĝos tien por iuj ajn informoj aŭ konstati la laborkondiĉojn de BEA.

La aliaj ejoj vizitotaj estas la Esperanto-librejoj. Ankaŭ ili devas konsiderinde ŝanĝi sian aspekton, devas esti allogaj aranĝitaj en sia ekstero — kun la vitrinoj kaj kun sia enhavo — kun plej diversaj esperantaĵoj — memoraĵoj, flagoj, insignoj, libroj k. a.

Granda fiasko en nia reprezento kaj honto por ni estus, se la vendisto ne povus interparoli Esperante.

Estus tre oportune kaj dezirinde por la eksterlandanoj, se ili povus distingi la bulgarajn samideanojn kaj ricevi iajn ajn informojn, se niaj samlandanoj portus krom la verda stelo, ankaŭ eble la bulgaran trikoloron.

„Balkanturist“ devas aranĝi en sia oficejo reklamojn kun esperantaj tekstoj.

Ankaŭ sur aliaj vendejoj aŭ aliaj komunumaj ejoj en Sofio aŭ aliaj urboj de llando oni devas starigi neonreklamojn en Esperanto. En kunlaboro kun „Balkanturist“ oni devas eldoni gvidlibron en Esperanto kun enhavo simila al „Ekskursoj tra la bulgaraj antikvaĵoj de Simeon Mihajlov“.

Por la projektitaj ekskursoj oni devas prepari taŭgajn gvidistojn, konantajn bone la vidindaĵojn kaj la arkeologiajn rimarkindaĵojn en nia lando. Tiamaniere ni vere servos al la diversaj interesoj de niaj gastoj. Ne lastloke eble BEA devas proponi organizon de oficaĵ kursoj por kelneroj kaj hotelservistoj, por magazenvendistoj, por urbaj kaj vagonaraj konduktoroj, por poŝtoficistoj k. a. laboristoj, kiuj havos kontakton kun la kongresanoj. Ili devas bone adapti la fakajn esprimojn en Esperanto.

Ankaŭ la Esperanto-radiopropagando ne devas esti preterlasata.

D-ro Boris Nedkov

8-A INFANA ESPERANTO—KONGRESETO

Estas grava momento en la historio de la bulgara Esperanto-movado la 48-a Universala Kongreso de Esperanto. En la landon alvenos geesperantistoj el diversaj landoj de la mondo, veraj pacbatalantoj, manifestantoj de la granda homara ideo pri amikeco, solidareco kaj paco inter la popoloj.

Lau bela tradicio, starigita de kelkaj jaroj, samtempe kun la kongreso de la grandaĵuloj okazos ankaŭ la 8-a infana kongreseto. En ĝi partoprenos ĉirkaŭ 100 infanoj el diversaj landoj. En komuna loĝejo ili pasigos unu semajnon en amuzado, ludado kaj ĝojo. En tiu verda rondeto la infanoj de diversaj nacioj povos per la internacia lingvo Esperanto interkompreniĝi, konversacii pri siaj infanaj interesoj, deziroj, revoj. Per rakontoj pri siaj patrolandoj, per naciaj kantoj, dancoj kaj kostumoj la infanoj havos la eblecon ekkoni diversajn landojn pli bone, ol per kiu ajn lernado de geografio.

En tiu infana Esperanta familio naskiĝos la sento por homamo, por paca interkompreniĝo de la popoloj. Tiuj infanoj-esperantistoj iĝos la estontaj pacbatalantoj, ĉar ili certe scios, ke ĉie en la mondo estas homoj similaj al ili, kiuj havas samajn korojn kaj sinceran amon al ĉiuj nacioj.

Granda estas la eduka signifo de la infanaj kongresetoj. Jen pro kio, por ilia aranĝado estas necesaj multe da zorgoj kaj serioza laboro.

En la kongreseto partoprenos infanoj de 6 ĝis 13 jaraĝo, kiuj parolas bone Esperanton. Ili estos enloĝigitaj en komuna loĝejo kun bonaj ĉambroj.

Por eviti nacian interparolon, oni dispartigos la etulojn en diversnaciaj grupetoj.

Oni aranĝos varian amuzan programon, uzante por tiu celo la ĉarman parkon de la „Palaco de la Junpioniroj“, kie la infanoj trovos plej bonajn kondiĉojn por amuzado kaj ludado.

Okazos ankaŭ interesa unutaga ekskurso per aŭtobuso al „Vitoŝa-monto“, krome la aŭtobusa rondveturado tra la urbo, vizitado de la „Parko de la Libereco“ k. a.

En la programo oni antaŭvidas mallongajn programojn de la partoprenantoj en la kongreseto.

La amikoj de la infanoj, pedagogoj kaj gepatroj faros komunan viziton al la kongreseto je fiksita tago kaj horo. La gepatroj povos viziti siajn infanojn ĉiuvespere inter la vespermanĝo kaj enlitiĝo.

La aliĝkoto estas 35 gld. aŭ 12 levoj. Tiu ĉi sumo inkluzivas ĉiujn kotojn: loĝejon, manĝon, teatraĵojn, ekskursojn, prizorgadon k. a. Krome, ĉiu infano estos regule asekurita dum la kongressemaĵo.

La realigo de la kongresetplano ne estas facila laboro kaj postulas konscian kaj senlacaĵon agadon. Pro tio necese estas, ke ĉiuj samideanoj, amikoj de la infanoj, kiuj estas pretaj helpi la komitato de la infana kongreseto, anoncu sin al LKK, por ke oni povu al ili ĝustatempe doni konvenajn taskojn en diversaj aranĝoj.

La societoj en nia lando devas informi LKK-on pri la nombro de la infanoj, dezirantaj partopreni la kongreseton.

Laŭ la regularo du fidindaj esperantistoj devas garanti, ke la infano bone regas la lingvon. Plej bone estus, ke tion faru la estraro de la societo.

La tempo pasas rapide, la kongresa dato proksimiĝas. Urĝe necese estas jam nun streĉi la fortojn por atingi la deziratan sukceson de la 8-a Esperanta Infana Kongreseto.

Radka Rajnova

Atanas D. Atanasov — Ada

S U R P R I Z O

De vara leciono

Hodiaŭ mi travivis grandan surprizon. Sidante en mia ĉambro kaj legante broŝuron mi aŭdis ke iu frapetas la pordon. Ĉe mia ekvoko „Eniru!“ la pordo malfermiĝas kaj sur la sojlo aperas mia amiko Marko. Enirinte en la ĉambron, li fikse min ekrigardas, malfermas la buŝon kaj ekparolas... en Esperanto!

— Bonan tagon, kara Antono.

— Marko, vi parolas esperante!...

— Jes, kiel vi vidas. Mi jam estas via samideano.

— Sed kiel? Kiam? Mi ankoraŭ ne povas kredi al miaj oreloj...

Nun, ne malpli surprizite mi rimarkis sur la butonruo de Marko esperantan insignon — verdan kvinpintan steleton.

Marko mallonge klarigis al mi:

— Vizitante kun vi kaj kun Georgo antaŭ unu monato la Esperanto-kurson, mi ankoraŭ skeptike rigardis al la Esperanto-movado. Mi ankoraŭ konis nek la lingvon, nek la movadon, nek la problemon pri lingvo internacia ĝenerale. Sed vidante la vivan realecon en la kurso, mi ekpensis pli profunde. Mi ricevis de via instruisto literaturon pri tiuj problemoj, mi legis kaj komprenis la esencon de la afero kaj mi konvinkigis plene pri ĝia seriozeco. Do, mi havigis al mi lernolibron, eklernis diligente kaj obstine... kaj — vi vidas, kion mi povis atingi.

— Sola? Sen helpo de instruisto!

— Jes, aŭtodidakte.

— Brave, Marko. Sed vi ja povis viziti ankaŭ la kurson...

— Mi devis en plej mallonga tempo tralerni la materialon lernitan de vi en la kurso dum pli ol du monatoj. Kaj mi sukcesis. Poste, fininte la lernolibron, mi eklegis esperantajn literaturajn kaj mi plezure konstatis, ke mi jam ekposedis sufiĉe la lingvon, por veni kaj saluti vin jam kiel esperantisto.

— Mi estas ravita. Ironie al la kurso ĉi-vespere, mi kunprenos ankaŭ vin kaj mi vin prezentos al la instruisto kiel samideanon. Li certe estos tre kontenta. Vi venos, ĉu ne?

— Jes, konsentite.

— Morgaŭ la instruisto kondukos la kursanojn al kunveno de la loka Esperanto-societo. Mi interesiĝas pri tiu organizaĵo kaj intencas anĝeli al ĝi. Vizitante la kunvenon, mi ĵus tradus ĝian statuton. Venu ankaŭ vi morgaŭ al la kunveno. Ni ja devas jam ekvivi inter la esperantistoj.

Post kelkaj minutoj ni ambaŭ ekiris al la kursejo.

PROVERBOJ

Ne havante — petas, ricevinte — forĵetas
Cele pensite, ŝerce dirite.
Okulo ne atentas — dorso eksentas.

PARTICIPOJ (en adverba formo)

-ante = kiam (en la momento, dum) -as.
-inte = kiam jam -is (post kiam -is).
-onte = kiam -os.
-ate = kiam (dum) oni lin (ĝin) -as = estante -ata.
-ite = kiam (post kiam) oni lin (ĝin) -is = estante -ita.
-ote = kiam oni lin (ĝin) -os = estante -ota aŭ estonte -ata.

Li legas kuŝante (en kuŝa stato). Ŝi venis plorante (kiam ŝi venis, en la sama tempo ŝi ploris). Ŝi foriris salutinte nin (post kiam ŝi salutis nin). Prenante la leteron (en la momento, kiam li prenis, kiam li estis prenanta ĝin) li ne estis trankvila. Preninte la leteron (post kiam li prenis ĝin) li ĉiris la koverton kaj komencis avide legi. Li proksimiĝis ne vidante nin. Li proksimiĝis ne vidinte nin.

Li marŝis vidate de ĉiuj. Li venis vidite de neniuj. Aŭskultote de multaj li ne kuraĝas komenci la kantadon.

Noto. — Zamenhof rekomendas uzi anstataŭ prepozicion **sen** + infinitivo (vidu lec. 10 — Prepozicioj kiel konjunkcioj) la kombinon **ne** + participo adverba: ne dormante — anst. sen dormi; ne parolante — anst. sen paroli.

PREFIKSO

EK esprimas komencen de ago kaj ĝuste la momenton de tiu komenco. (Foje estas sentata pli signifo de komenco, alifoje — la momenteco de la ago).

Mi eklegis la libron = mi komencis legi ĝin.

Mi ekparolis rapide. Ni ekkantu! Ĉu vi ekdormas? Ekiro!

Ŝi ekkriis (ŝi ellasis unufojan krion).

Ekscii = sciigi. Eksidi = sidigi. Ekstari = stariĝi.

EK de nun = komence de nun. Ek al laboro!

(Komencu tuj la laboron).

NOTINDAJ ESPRIMOJ

Mi salutas vin kiel esperantisto (mi, estante esperantisto, salutas vin).

Mu salutas vin kiel esperantiston (mi salutas vin en via kvalito de esperantisto).

EKZERCOJ

1. En la sekvantaj frazoj metu la neplenskribitajn verbojn en partician adverban formon:

Labor... nia ĝardenisto ĉiam kantas.

Mi legas kuŝ..., sed mi povas skribi nur sid...

Ven... li vidis, ke la ĉambro estas jam malplena.

Rapid... vi povos atingi lin post duonhoro.

Parol... ŝi oscedas.

2. En la sekvantaj frazoj anstataŭigu per participoj en adverba formo la respektivajn esprimojn:

Kiam mi venis denove en mian gepatran domon, mi eksentis novan forton en mi.

Kiam vi venos, vi eble trovos min jam en la lito.

Post kiam ni marŝis la tutan tagon, fine ni rimarkis altajn domojn; tio estis la urbo, kiun ni celis.

Kiam ni ekvidis la urbon, ni rapidigis niajn paŝojn.

3. En la sekvantaj frazoj uzu la prefikson **ek** anstataŭ la respektivajn esprimojn:

Li komencis paroli en Esperanto post tre mallonga lernado.

Kiam vi komencos lerni Esperanton, sciigu min.

Se ŝi komencos kanti, ni ĉiuj kunkantos.

KANTO DE JUNAJ KUBANOJ

Kiel sepkorda gitar', kantas tago sunriĉa
super palmoj kaj floroj de l'insulo feliĉa.

Vin — poemon el ŝtalo, vin — poemon el rozoj,
minacadas danĝero de militfuriozoj.

Vin ni prefas defendi ĝis la lasta spirforto,
ĝis la lasta sangguto: — Aŭ patrio, aŭ morto!

Kaj ni venkos vin, certe, altrudema fimastro,
ĉar inspiras kaj gvidas nin genio de Kastro!

Ludmila Jevsejeva
Riga

PRINTEMPA REVIVIĜO

Sur la ĉaro, flora ĉaro — alte super blua maro —
kun flugila blankĉeval',
venas vente, ĝojosente, kaj aperas flortorente
la printemp' en ĉiu val'.

Kaj amoro, reĝ' de l'koro kaj portant' de l'amdoloro,
flugas kun serena vent'...
Kor' efiras kaj eldiras: „Viajn sagojn mi sopiras,
ho, sorĉist' de amosent'!“

Ĉie lumas, mi maljunas — tempo nin perfide punas —
ĉu malgajo kaj lament'?
— Am' pasia en ebrio, flustras al mi sorĉa krio:
„Nur eternas amosent'!“

Ivan St. Georgiev

REMEMORO

En ĉi tiu bela valo
mia kara frat' pereis —
en la lukto malegala
kun faŝista band' mizera.

Kaptis lin ekzekutistoj,
de l'popol' premantoj fiaj,
lin torturis, sed persistis
la heroo — frato mia.

Kaj eĉ vorton de perfido
ne ellasis partizano,
— La libero vivu, spite!
tuj reeĥis la Balkano...

Kina Uzunova

PRINTEMPO

Per gesto sorĉa la printempo
ĉi nokton kalvan teron sternis,
per silkoverda novtapiŝo,
kaj sunpordegon kaŝmalfermis.

Per rozburgonoj ĝi ornamis
la branĉojn de l'dormantaj arboj,
kaj pluv' pilgrime tuj aspergis
naturon per larm-perloj klaraj...

Ivan St. Georgiev

Antaŭfesta humoro surverŝas ankaŭ nian urbon. Festa humoro ŝprucas en la okuloj de la homoj: junaj kaj maljunaj. Vesperigaŝ. Reehas la paŝoj de tiuj, kiuj estas farintaj la lastajn aĉetaĵojn.

Mi estas antaŭ la radio-aparato kaj aŭskultas festmuzikon, popolajn kantojn de elstaraj popoloj kaj operaj gekantistoj. La tempo forflugas. La montrilo de la horloĝo rapidas al la dudek-kvara. El ĉiuj stacioj oni aŭdas dancmuzikon. Dancas ankaŭ tiuj, kies harojn surŝutis neĝostrioj. Ĝojas kaj festenas la homoj travivante la lastajn momentojn de la malnova jaro. Kaj ĝi rapidas malforta, senpova, sin disdoninta al la milionoj kaj dancanta sian lastan dancon, kun la tempo, tiu eterna petola junulo, kiu jam postkuras la blondan belulinon, ĉiam evitantan lian rigardon.

La horloĝmontrilo proksimiĝas al la dekdua. La tempo kaj Novjaro stariĝas kun plena staturo. Apud ili ekstaras la malnova jaro kaj diras al la tempo:

— Vi tutan vesperon evitas min. Kaj mi tiel sopiras la lastan dancon kun vi!

— Mi amas la belecon kaj la energion de la blonda belulino, — diras la tempo kaj envie rigardas la belulinon.

— Mi ne volas danci kun vi, ĉar vi estas jam majuna kaj malforta.

— Estas nature ami la junecon, — diras la malnova jaro kun premita sopiro...

— Sed aŭdu miajn lastajn vortojn! Ni estas fratinoj kaj regas laŭvice unu post alia. La nova jaro ne povas vivi kaj labori sen mi. Mi reflektas la homan saĝon kaj sperton. La novjaro ekmarŝas sur la larĝa vojo de la vivo. Ĝi prenas la sperton de la homoj kaj transformas ĝin praktike. Tio ĝi povas fari se nur apogos sin al mi, same kiel mi apogis min al mia antaŭulino. Ekmemoru! En ĉio, kreita ĝis nun, parolas vico da jaroj. Mi daŭrigis la konstruon de uzino „Kremikovci“ kaj aliaj objektoj kaj transdonas ilin al vi, mia fratino — blonda belulino. En ĝi laboras junaj entuziasmoj, kiuj kune kun vi kunigos sian sorton kun la sorto de la hejmlando. Kaj vi devas fini la uzinon „Kremikovci“ la komencitan laboron de la pasintaj jaroj. Vi maljunuĝos, sed vi ne devas bedaŭri, ĉar la valoro de la jaroj kaj la homoj konsistas en tio: ne kiom da jaroj ili vivis, sed kion ili estas kreintaj. Nun adiaŭ, miaj amatoj!

La horloĝmontrilo mezuras la dekduan kaj preparas la kison de la tempo kun la Novjaro. La tempo kune kun la belulino ekflugas en la impeto de la ĝoja danco...

Lazarina Kânĉeva
Pazarĝik

„MONDA KULTURO“ EN ESPERANTO

Rotterdam, novembro (IGS/520). — Aperis, eldone de Universala Esperanto-Asocio, la unua kaj la dua kajeroj de la nova internacia arta revuo, kiu sub la nomo „Monda Kulturo“ aperos kvarfoje jare en Esperanto. Suplementante la plurajn literaturajn revuojn jam aperantajn en la Internacia Lingvo, la revuo dediĉos sin al la originala literaturo de la Internacia Lingvo kaj krome turnos sin al filmaj kaj teatraj temoj.

Ĉ u v i p a ĝ i s

*v i a n m e m b r o -
k o t i z o n ?*

N e p r o k r a s t u ! !

REMEMORO PRI MOIS LEVI

„Li estas pacema kiel bovideto“ — tiel oni prezentis al mi unuafoje Mois Levi, kiam li estis ankoraŭ lernanto en la unuaj klasoj de la gimnazio en Varna. Iom poste, kiam mi havis la eblecon intimiĝi kaj observi de proksime Mois-on, mi povis penetri en la sencon de tiu karakterizaĵo.

La milda rideto ne malsupreniris de liaj lipoj, ĉiam li estis atentema al siaj kamaradoj, ĉiam komplezema kaj afabla. Tiu ĉi bonanimeco tamen, transformiĝis en grandan malamon, kiam temis pri la klasa malamiko. Lia milda karaktero ŝanĝiĝis en akran glavon, en liaj okuloj ekbrilis revolucia fajro. Li ne kondutis formale, kiam li devis plenumi revolucionan taskon; li ne demandis, de kiu ĝi estas starigita kaj ĉu por li ĝi estas destinita.

Oni komisiis al mi foje de la Distrikta Komitato de la Komsomolo instalii en nekompromitita domo malgrandan presmaŝinon. La tasko estis malfacila, ĉar nekompromitita al la faŝista polico loĝejoj, en kiuj oni akceptus similan danĝeran aferon ne estis restintaj abunde en la urbo. Mi petis Mois-on helpi al mi. Li tuj konsentis. Vintra glacia turnovento forbalais la urbajn stratojn. Tie kaj tie montriĝis homoj. Frapante de pordo al pordo, ricevante rifuzojn sub justajnaj pretekstoj, ni finfine sukcesis konvinki unu kamaradon akcepti la danĝeran inventaron.

Kamarado Mois Levi partoprenis aktive en la kultura vivo de la urbo — en la agado de la kulturdomoj, de la esperanta kaj la abstinula societoj, en la junulara kooperativa grupo. Li disvastigis la progreseman gazetaron: Rabsekor, Internacia Lingvo, Pogled, Jar k. a. Li ĉiam estis sur sia batalposteno, neniam rifuzis plenumen de tasko, kiom ajn malfacila ĝi estas. La kamaradoj, kiuj havis ko-



ntakton kun li, neniam forgesos lian helpemon, kamaradecan zorgon kaj kunagon, oferemon por la komuna afero.

Lastfoje ni renkontiĝis kun Mois dum februaro 1943, kiam mi, revenante el Sofio, restis por kelkaj tagoj en Varna. Estis kolektenda mono por preparata tiam junulara proceso. Car mi jam estis perdinta la ligojn en la urbo, mi denove turnis min al M. Levi por helpo. Kiel mi kredis, nur en du tagoj li kolektis la necesan sumon, kiu kontribuis al la organizo de la pledo de la kamaradoj.

Ne longe post tio mi ricevis leteron, en kiu oni aludis pri la martira morto de la bona kamarado kaj sindona revoluciulo Mois Levi.

Violin Oljanov

ĈU LA TABAKFUMADO POVAS KAŬZI KANCERAN MALSANIĜON DE LA PULMO

La nikotino apartenas al tiuj venenoj, kiujn oni nomas eŭforistikaj, ĉar ili kreas falsan bonhumoron. La nikotino estas kreanto de trompa bonŝtato, alkutimiĝo kaj pasiĝo. La kronika veneniĝo per ĝi nomiĝas **nikotinismo** aŭ **tabakismo**. Ĝi efektiviĝas per fumado de sekaj folioj de la kreskaĵo **Nicotiana tabacum**, transportita de Ameriko post ĝia malkovro. La nikotinismo tre rapide ĉirkaŭkaptis la tutan mondon. Nun centoj da milionoj da homoj fumas aŭ uzas la tabakon en aliaj formoj.

Hodiaŭ preskaŭ neniu demandas ĉu la tabako estas malutila, ĉar ĉiuj, inkluzive la fumantojn mem, scias, ke la tabakismo malrapide kondukas al gravaj aliĝoj en la organismo. Tiuj aliĝoj venigas seriozajn malsanojn de spira, koro-angia kaj digesta sistemoj. Tamen malmultaj scias ĝis kiaj gradoj kaj formoj povas atingi ĝia malbona efiko! Tial ofte iuj demandas ĉu la tabakfumado havas rilaton al la pulma kancermalsaniĝo.

Al tiu ĉi demando respondas pozitive du el la nuntempaj plej fidindaj sciencoj — **socia statistiko** kaj **scienca eksperimento**.

Laŭ la internacia statistiko la kanceraj malsaniĝoj de diversaj organoj dum la lastaj 10–20 jaroj havas preskaŭ konstantan nivelon aŭ tendencan al plimalgrandiĝo, sed la pulma kancero progresive trograndiĝis de 2 al 100%. Plej altaj malsaniĝado kaj mortonombro estas notitaj en Anglujo. Dum 1900 jaro de 1 miliono da homoj 8 estis mortintaj pro pulma kancero, dum 1953 jaro — 342 aŭ kvardekoble pli. En Svislando, Danujo, Usono — sesoble pli. Similaj estas la donitaĵoj pri Sovetunio.

La tumoraj malsanoj havas plej diversajn — mekanikajn incitilojn, radioaktivajn kaj kemiajn substancojn, virusojn kaj aliajn.

Por apero de la pulma kancero, kaj kancera malsano en la aliaj organoj, tre gravan rolon ludas la kemiaĵoj — benzpireno, benzantraceno, metilholantreno, arseno, radioaktivaj izotopoj k. a. i. Ĉiuj substancoj nomiĝas kancerigaj aŭ kancerogenaj. Ilin oni povas malkovri en la karba nikotino kaj aliaj gudroj, en la fumo de la brulanta nafto, karboj, en la malpurigita atmosfero de grandaj industriaj urboj, en la fumo de tabako k. c.

Laŭ la opinio de multaj nuntempaj scienculoj la tumoroj aperas pli ofte sub la kompleksa efiko de multaj kaŭzoj — kemiaj, radiaj, mekanikaj kaj biologiaj. De la momento de etiko de la kancerogenaj substancoj ĝis la apero de tumoroj povas pasi tre longa tempo: por la musoj — ĉirkaŭ 1 jaro, por la simioj (kiam oni agas sur ilin per granda kvanto da substanco) — 8 ĝis 15 jaroj kaj por la homoj — 20 ĝis 30 jaroj, ofte pli malmulte.

Kiuj faktoj malkovras la kancerigan rolon de la tabaka fumo? En la fumo kaj gudro de cigaredoj, cigaroj kaj pipoj enteniĝas la samaj kancerigaĵoj. Fumanto, kiu fumas duoncigaredan skatolon po tage, dum 30 jaroj trapasigas per sia pulmo 5400 gr. da tabaka gudro, kiu entenas 22 mgr. da kancerigaj substancoj, kaj se oni fumas 2 skatolojn — 88 mgr.

Dum la lastaj 6–7 jardekoj la tabakfumado pli kaj pli disvastiĝas. En Anglujo dum periodo de 1881 ĝis 1950 jaro la fumado de cigaredoj kaj cigaroj estas pligrandiĝanta kvardekoble, en Usono tridekoble, en Sovetunio de 1913 jaro ĝis 1955 — proksimume naŭoble (8,8).

Pri la ligo inter la tabakfumado kaj la pulmokancero parolas multaj sanitaro-statistikaj kaj patologo-anatomiaj esploroj. La norvega scienculo Krainberg konstatis, ke inter tabakfumantoj plej ofte disvastiĝas kancero en la supraj tavoloj de la bronka mukomembrano kun plataj grandaj kaj malgrandaj ĉeletoj. Ĉe nefumantoj plej ofte aperas kancero en la profundeco de la mukomembrano. Dum la lastaj du jardekoj la kancero de granda tipo ne plimultiĝas, dum la kancero de platĉela tipo sencese plimultiĝas. La scienculo Dal prezentas la jenajn enketajn faktojn de diversaj malsanulejoj. Dum la periodo de 1933 ĝis 1954 jaro de 6039 viroj malsanaj de pulma kancero 5779 montriĝis tabakfumantoj kaj nur 260 nefumantoj. En Usono de la 1 de januaro ĝis la 31 de majo 1952 jaro oni registris 64208 sanajn virojn en aĝo de 50 ĝis 69 jaraj. Inter ili 32392 neniam tabakfumis, kaj la aliaj 31816 fumis dum la pasinteco aŭ ankaŭ en la momento fumis. Post 5 jaroj kaj 5 monatoj el la grupa de nefumantoj 4 personoj malsaniĝis de pulma kancero, kaj en la grupo de tabakfumantoj — 81 aŭ 20-oble pli.

De la pulma kancero ne estas antaŭgarditaj ankaŭ la tabakfumantinoj. La statistiko evidentiĝas pri Anglujo, kie la nombro de la virinoj mortintaj de pulma kancero dum la lastaj jaroj duobliĝas.

La tumora malsano aperas pli ofte en tiuj organoj, en kiuj amasiĝas pli granda kvanto da gudro el tabaka fumo, kio dependas de la maniero de tabakfumado — ĉu per cigaro, cigaredo aŭ pipo.

La eksperimentoj sur diversaj bestoj konfirmas la statistikajn, klinikajn kaj patologoanatomiajn konkludojn.

Kvankam la nikotino ne posedas kancerogenan potencon ĝi estas kulpa pri la nesuperebla deziro fumi tabakon kaj pri la pezaj disfunkcioj en la nerva sistemo. La opinio, ke cigaredo kun malmulte da nikotino ne havas kancerogenan potencon, malpravas. Profesoro Šabad L. M. komunikas, ke el 23 blankaj musoj bredataj en atmosfero de tabakfumo post 1 jaro 21 malsaniĝis de kancero.

Ĝenerale la tabako pro tiuj substancoj malbonigas la saŭon kaj ekspozicias la organismon al danĝero de pulma kancero. La kotonaj kaj paperaj filtroj ne forigas la minacon. Ununura antaŭgarda rimedo por plimalgrandigo de la ebleco de malsaniĝo estas la plena kaj definitiva ĉeso de tabakfumado. Tre multe da fumantoj sincere deziras disiĝi de tiu ĉi pasio, tamen ne sukcesas. La opinio, ke oni sukcesus, se „iom post iom“ malmultnombriĝas la cigaredojn, estas trompa, ĉar la nikotino estas eŭforistika veneno. Al la personoj, kiuj memvole ne povas superi la nikotinisman turmentantan pasion, la medicino povas helpi per rimedoj kreantaj abomenon al la tabakfumado.

P. Pejčev — docento de farmakologio

N. Nikiforov — asistanto

Medicina Instituto—Plovdiv

FAKKUNSIDO DE LA MEDICINISTOJ ESPERANTISTOJ EN BURGAS

La Medicina sekcio ĉe BEA organizis trian fojon sian fakkunsidon la medicinistoj esperantistoj en la kadroj de la 35-a Bulgara Esperanto-kongreso en Burgas dum julio 1962.

Ĝin partoprenis 16 medicinistoj esperantistoj, kiuj estas dividitaj jene laŭ profesio: 10 kuracistoj (el kiuj 2 virinoj), 3 medicinaj fratinoj, 1 laborantino, 1 helpkuracisto kaj 1 alia mezmedicinisto. El la kuracistoj 1 estas supera scienca kunlaboranto ĉe la Instituto pri Kurortologio kaj Fizioterapio en Sofio (D-ro Todor Todorov el Sofio, prezidanto de la Medicina sekcio), 1 — eksteretata scienca kunlaboranto ĉe la Bulgara Akademio de la Sciencoj (D-ro Stefan Kadijev el Sofio, kulturkleriganto de la Medicina sekcio) kaj 1 — distrikta kuracisto (D-ro Trendafil Gramatikov — Jambol). La sekretario de la Medicina sekcio D-ro Stojan Moraresku

estis reelektita membro de CK de BEA. Laŭ loĝloko la partoprenantoj estas el Sofio — 6, Plovdiv — 2, Varna — 1, Burgas — 2, Stara Zagora — 1, Pazarĝik — 1, Jambol — 1, Kubrat — 1 kaj Elhovo — 1.

La estraro faris raporton pri la laboro de la Medicina sekcio ĉe Bulgara Esperantista Asocio dum la periodo de 15 de julio 1960 ĝis 15 de julio 1962. La ĉeestantoj pridiskutante la raporton rakontis ankaŭ pri sia sperto. Por la estonta laboro la fakkunsido rekomendas al ĉiuj medicinistoj esperantistoj en la lando kontaktiĝi kun la lokaj esperantaj societoj kaj ekagi fervore en ligo ankaŭ kun la 48-a UEK en Sofio dum 1963. Ĉiu havas la devon disvastigi Esperanton en la medioj, kie laboras, aboni la organon de BEA „Bulgara Esperantisto“ kaj nepre aliĝi el 48-a UEK. La grupoj de medicinistoj esperantistoj ĉie devas ellabori pli vigle, havante antaŭvide la taskon plibonigi konstante sian lingvan nivelon por havi eblecon ĉie serioze prezenti sin kiel esperantistoj kaj kontaktiĝi bone kun la alilandaj esperantistoj dum la 48-a UEK. Nur tiel ni povos bone prezenti nin kaj nian esperantan movadon. Ĉiuj devas pensi pri taŭgaj materialoj, kiujn la estraro preparos por presigo en „Bulgara Esperantisto“ kaj aliloke.

La estraro prezentis al BEA kaj al Ministerio de la sanprotekto projekton de entreprenoj en ligo kun la 48-a UEK.

La estraro estas en konstantaj ligoj kun la sekretario de Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA) — D-ro Maria Jarnuszkiewicz—Pollando.

La estraro estis reelektita: D-ro Todorov — prezidanto, D-ro Moraresku — sekretario kaj D-ro Kadiev — kulturkleriganto.

D-ro St. Moraresku

SCIIGOJ

— La Medicina sekcio ĉe BEA prezentis al BEA kaj al la Ministerio de la popola sanigo siajn entreprenojn en ligo kun la organizo de la fakkunsido de la medicinistoj esperantistoj dum la 48-a UEK. La entreprenoj estas aprobitaj kaj nun la sekcio laboras por ilia realigo. La medicinistoj esperantistoj en la lando estas petataj kontaktiĝi kun la estraro de la sekcio por helpi ĝin laboron dum la antaŭkongresa preparo kaj dum la kongreso mem.

— La Medicina sekcio estas en ligoj kun la sekretario de UMEA.

— Lige kun la 48-a UEK la medicinistoj esperantistoj estas invitataj aliĝi al la kongreso por havi eblecon partopreni en ĉiuj aranĝoj dum la kongreso.

— La medicinistoj esperantistoj devas esti regulaj membroj de la lokaj esperantaj societoj aŭ rekte al la asocio, kie ne estas societoj.

— Ĉiu regula membro povas fariĝi membro de la Medicina sekcio per sendo de skriba deklaro al sekcio ĉe BEA — poŝtkasto 66, Sofio.

— La estraro de la Medicina sekcio petas la medicinistojn esperantistojn en la lando sendi interesajn sciencajn kaj science-popularajn materialojn kaj sciigojn, kiuj estos publikigitaj en la esperantista gazetararo, inkluzive en „Zdraven front“.

— Ĉe la Asocio de la sciencaj laboristoj estas fondita Esperantista sekcio.

— La Medicina sekcio ricevis de la Direkcio de la Sekcio pri Medicinaj aparatoj N. V. Philips, EINDHOVEN, Nederlando, luksan esperantlingvan mallongigitan katalogon kiu donas super-rigardon pri X-radiaj kaj elektromedicinaj aparatoj kaj ekipoj fabrikataj de Philips kaj haveblaj en ĉiuj partoj de la mondo.

NOVA GRAVA SUKCESO DE ESPERANTO EN BULGARIO

La filologia fakultato ĉe la Ŝtata Universitato „Kliment Ŭhridski“ en Sofio (la plej malnova universitato en Bulgario) decidis enkonduki nedevigan instruadon de Esperanto. La Akademia Konsilantaro de la Universitato aprobis tiun ĉi decidon kaj prezentis ĝin por konfirmo al la Ministerio de Klerigo kaj Kulturo. La Ministerio sankciis la decidon kaj Esperanto jam estas oficiale enskribita inter la instruataj lernobjektoj de la Sofia Universitato.

La plej gravaj ĉeturbaj ĵurnaloj raportis pri tiu ĉi fakto.

Kiel lektoro de Esperanto estas oficigita la konata malnova bulgara esperantisto Atanas D. Atanasov (Ada).

— Ĉiumerkrede de la 16 horo la estraro de la Medicina sekcio havas kunsidojn en la Sofia Distrikta Sanepidstacio, str. Neofit Rilski 64 — ĉe D-ro Stojan Moraresku — telefono 8-48-68. Ĉiuj membroj de la sekcio povas partopreni.

С ПОГЛЕД КЪМ ДВАТА ФЛАНГА НА ЕСПЕРАНТСКОТО ДВИЖЕНИЕ

Става дума за беловласите есперантисти, пълни с опит и сили, и за пионерите есперантисти с червени връзки на врата, пълни с енергия, ентузиазъм и мечти. Ние виждаме и едните и другите по есперантските конгреси. Видяхме ги и в Бургас през юли 1962 год. Но организационна форма и мероприятия специално за тях никой не е предвиждал и създал. Това положение повече не бива да се търпи. Време е с промяната на организационната структура на есперантското движение у нас съобразно с окончателното, административно деление на страната и производствения принцип на изграждането на всички видове организации да се намери най-подходяща форма на организиране и проява на есперантистите ветерани и есперантистите пионери. Реорганизацията и въвеждането на нови форми и работата на нашето движение са продиктувани и от решенията на историческия VIII конгрес на нашата славна БКП. В доклада, изнесен от др. Т. Живков, е казано: „Обществените организации, обаче, трябва да се преустройват и да наситат цялата си дейност с ново съдържание с оглед новия етап на нашето развитие... Масовите организации успешно преодоляват елементите на догматизъм, сектанство и скованост, освобождават се от неправилните методи на работа.“ Безспорно, с пълна сила, горната най-авторитетна преценка и директивно указание на партията-ръководителка се отнася и за Българския есперантски съюз. Впрочем, не е необходимо умуване и дирене на най-подходящи форми и методи на работа. Другите масови организации имат такива форми на организационен строеж и дейност, съобразени както с административния, така и с производствения принцип. Да вземем за пример само формите на строеж и дейност на Българския туристически съюз: 1. Секции по цехове, предприятия, учреждения, училища (туристическа секция — низово звено). Съответстваща на нея може да бъде **Есперантската група** — нашето низово звено в цехове, отдели, фабрики, учреждения, училища и пр. 2. **Туристическо дружество** — по предприятия, учреждения, училища, райони и селища. Съответстващо при нас е също **Есперантското дружество**, изградено на производствен и териториален принцип. 3. **Окръжен комитет на БТС**, обединяващ дружествата, а чрез тях и туристическите секции в района на окръга. Съответстващ — **Градски комитет на БЕС** за градовете и **Градски окръжен комитет на БЕС** за градовете — окръжни центрове. 4. **Централен комитет на БТС** — съответно ЦК на БЕС, със съответните отдели, комисии и секции.

Така както БТС вече разрешава въпроса с беловласите туристи, като към ЦК създаде съвет на ветераните, а при туристическите дружества създава комисия на ветераните със свои ръководства, така може, и час по-скоро трябва към ЦК на БЕС да бъде изграден съвет на ветераните, а при съответните дружества и при Градските и Окръжните градски комитети — комисия на ветераните със свои ръководства.

Деца и пионерите туристи се организират в клубовете „Млад турист“ към пионерските домове, към отделните училища и пр. А нима не може и не трябва да изградим там и клубове „Млад есперантист“ или „Международен клуб на младите есперантисти“?

A зашто за ветераните-есперантисти и за пионерите-есперантисти да не се отделят съответни страници или рубрики в списание „Булгара есперантисто“, а по време на конгресите да не се предвиждат отделни мероприятия както за едните, така и за другите — за двата фланга на редиците на есперантистите в нашата страна!

Наистина, крайно време е да се прояви внимание и доверие към безвластите есперантисти-ветерани и към пламенните пионери-есперантисти.

Йордан Д. Калинов, Русе

„ORA SPIKO“ — KIO ĜI ESTAS?

Certe multaj el niaj aktivaj funkciuloj, kie ajn ili estas, ofte sin demandas, ĉu la kresko de nia movado, ĉu la disvastiĝo de nia lingvo korespondas al la zorgoj kaj la fortoj kiujn ni dediĉas al ĝi. Laŭ mi, kvankam lastatempe ni ĉiam raportas pri sukcesoj, ili estas tro modestaj kompare al nia penado kaj streĉa laboro. Pensante pri tio antaŭ miaj okuloj aperas la jena bildo. Mi vidas grupon da homoj plugantaj virgan teron, teron fekundan kaj senlace semantaj bonkvalitajn fruktoĉonajn semojn. Ili faras ĉion laŭ pruvitaj metodoj plene utiligante la koncernajn sciencojn kaj la semoj kreskas vigle, promesante riĉan rikolton. Kaj vere rikolto estas, sed ĝuste kiam oni devas rikolti, la homoj, pensante ke aliaj devas fari tion, ke ili plenumis sian devon, forlasas la laborkampon. Kaj kiam venos aliaj la ventoj forblovis la frukton de la rikolto, la birdoj multon formangis, la pluvo parton fuŝis kaj ili apenaŭ kolektas nur parteton de la riĉa rikolto.

Ni informas la publikon pri nia lingvo, ni anoncas studrondojn, kursojn ni penetras lernejojn kaj universitatojn kaj komencas semi, komencas instrui la lingvon. Ni atingas la mezon de la lernolibro, ni atingas la finon kaj memkontentaj ni raportas: komencis la studadon tion kaj tiom, restis ĝis fino 3 kvaronoj el ĉiuj. Kaj tamen okazas ia miraklo, la vicoj de la societo apenaŭ plimultiĝas per kelkaj novaj esperantistoj. Kion tiel gravan ni ignoras, preterlasas kaj ĝi kruela venĝas al ni? Se ni kontrolus kiuj viciĝas inter ni, ni facile ĉion komprenus. Bonvolu ĉirkaŭrigardi la vicojn de la societanoj: la nove venintaj al ni estas precipe nur tiuj el la studentaj lastatempe la lingvon, al kiuj ni sukcesis krei elekcon praktike utiligi la lingvon en sia faka, profesia, ĉiutaga laboro. Restas ĉe ni tiuj, kiujn ni sukcesis ligi kun alilandanoj kaj inter ili kreis sincera, fruktodona amikeco. Jen estas la eta kaj grava afero, kiun ni neglekcas, kiun ni faras nur preskaŭ hazarde. Tial ankaŭ niaj finaj rezultoj estas tiel nekontentigaj. Ordinare la novulo trovas adresojn sur la paĝoj de la revuoj kaj entuziasme sribas. La homo tamen jam ricevis multajn leterojn, li jam elektis siajn korespondantojn kaj ne pli emas multnombrigi siajn amikojn. La novulo ree sribas ree okazis la sama afero. Eĉ ofte neniam respondo venas. Li sribas, nur post longaj admono, tiam fojon kaj jam tute malespejgas kaj... ne plu estas videbla inter ni. Nun, kiam la fakliteraturo — libroj kaj perio laĵoj en Espe anto estas pli ol nesufiĉa (por tio ni povus paroli aliffoje) la kreo de personaj ligoj kun alilando estas la ĉefa praktika utiligo de la lingvo. Kaj se tio ne okazas, la novulo komencas sin demandi: „Sed kial mi lernis tiun ĉi lingvon, kion nun mifaru per ĝi?“ Ja, vi ĉiuj scias, ke plugilo ne funkcianta rustuĝas.

Forigi tiun ĉi gravan mankon en nia laboro, helpi por ke oni akiru maksimumon de la rikolto, jen estas la fundamenta celo de „Ora Spiko“, la kon-

ciza simbola nomo de la Internacia Kunliga Centro de Esperanto—Kursoj. La afero estas sufiĉe grava. La landaj asocioj esperantistaj ne devas resti fermitaj en si mem. Kiamaniere efektivas tion ĉi „Ora Spiko“? Ĉiu kursgvidanto sin anoncas al „Ora Spiko“ rekte aŭ pere de la landaj fakoj, menciante kiu estas la konsisto de lia kurso, kiuj estas liaj preferoj. „Ora Spiko“ kunligas la kursgvidantojn kaj ili priparolas inter si la detalojn konforme al la „bazaj principoj“ de „Ora Spiko“. Ili interŝanĝas sperton kaj ligas unue la kursojn kiel tuto. Tio multe helpas, ke la gekursanoj pli bone kaj facile interamikigu kaj ekvivu kiel kolektivo — kaj poste individue, konsiderante ĉies inklinojn, hobiajn, preferojn ktp. Tiamaniere paralele kun la pligrandigo de la lingvo-konoj plifortiĝas la amikeco inter la gekursanoj el diversaj landoj. Se vi aldonus al tio la interŝanĝon de donacoj diversaj, se vi aldonus al tio eventualan reciprokan viziton ktp. la firma kaj senduba rezulto estos, ke tiuj ĉi kusanoj por ĉiam restos ĉe ni. Ili fariĝus aktivuloj, ili puŝus la aferon pluen. Nun ĉiumonate ni legas ĉiujn ricevitaĵajn leterojn kaj ni prijuĝas kiu el ili estas plej interesa, ĉiufanke, kaj ni skribas al la alia kurso, ekzemple: „Ĉi monaton Dubravka sendis al ni la plej bonan leteron. Bonvolu doni al ŝi nian libropremion.“ Nun el la libroj ni donas al tiu, kiu faras plej bonan tejlaboron aŭ klaslaboron ktp. Oni petis, ke ni sendu al ili humoraĵojn — do tio ankaŭ povas esti indikilo por distingo per libropremio. Mi zorgas, ke por sia naskiĝtago la korespondanto de mia lernanto ricevu ian ajn etan donacon. Ni surbendigas specialan programon kiun oni tie aŭskultas. Jen estas la internacia amikeco kaj solidareco — la interkompreniĝo, la paca kunvivo kaj kunlaboro.

Aliflanke en tiu tuta laboro la gekursanoj pli kaj pli eksentas sin kiel kolektivo, eksentas sin kiel esperantistoj — tio estas la eduka flanko de mia laboro — kaj preskaŭ nerimarkeble ili enfluas en la lokan societon, jam profunde konvinkitaj. Tiel plifortiĝas la societo, plifortiĝas la landa asocio, plifortiĝas UEA.

Petko Arnaudov
Pazargik

D-RO HUGO STEINER 85-JARAĜA

D-ro Hugo Steiner, fondinto de Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno naskiĝis la 26-an de februaro 1878 en Retz, Aŭstrio, do li jam estas 85-jaraĝa. Malgraŭ tia granda aĝo li ankoraŭ ĉiutage laboras 8 horojn por la Muzeo kaj, Esperanto kaj propramane skribas minimume 600 paĝojn sur matricojn, grandioza laboro eĉ por pli juna homo, kiu postulos energion, paciencon kaj persiston. Li lernis Esperanton en 1911, partoprenis en la 8-a Universala Kongreso de Esperanto en Krakovo en 1912, kie li konatiĝis kun D-ro L. Zamenhof. Li estas fondinto de „Aŭstria Esperantisto“, estis ĝenerala sekretario kaj prezidanto de Aŭstria Esperanto-Asocio, komitatano de UEA. En 1927 li fondis la Muzeon en Vieno. En 1935 li iniciatis kaj preparis la 28-an UK de Esperanto, kiu okazis en Vieno en 1936. En 1935 li vizitis Bulgarion kaj prelegis per la radio en Varna kaj Sofio. En 1938 Gestapo arestis lin pro troa propagando por Aŭstrio pere de Esperanto. En 1951 okazis inaŭguro de „Panteono“ kaj Konstanta Ekspozicio en la Muzeo. En 1952 laŭ iniciato de H. Steiner en Wörge, Tirolo starigis la unua Zamenhof-monumento en Eŭropo. En 1957 Steiner verkis la unuan volumon de la Katalogo pri la Esperanto-literaturo de la Muzeo laŭ internacia Dekuma Klasifikado, en 1958 la duan kaj en 1962 la trian. En 1957



Steiner iniciatis kaj en 1958 oni starigis Monumenton de Zamenhof en Vieno. En 1961 Steiner festis sian oran Esperanto-jubileon.

La tuta vivo de H. Steiner estis dediĉita al la servo de la popolinterkomprenigo.

Ni bondeziras al li longan vivon por la prospero de la Movado kaj speciale de la Muzeo.

Al estimata s-ro
D-ro Hugo Steiner
Hofburg, Wien I

AŬSTRUJO

Tre estimata s-ano Steiner,

La estraro de Bulgara Esperantista Asocio sendas al vi plej varmajn gratulojn okaze de via 85-jaraĝo kaj bondeziras al vi ankoraŭ longan vivon por la bono kaj brila prospero de la fondita de vi internacia Esperanto-Muzeo en Vieno kaj ĝenerale de la Esperanto-movado en via bela patrolando Aŭstrujo.

Sekretario: V. Oljanov

Prezidanto: Ĥr. Gorov

POR LA FINKONSTRUO DE NIA MONTODOMO

La decidaj monatoj kaj semajnoj por finkonstruo de la montodomo jam alvenis. En tre limigita temperiodo ni devas multon fari: ŝmiri la murojn, alnaji la plankon kaj mebligi la domon. En la Komuna Departemento „Lesoparkove“ arkitekto Ĉilo Ĝilov kun siaj kolegoj ellaboras la planon por plibeligo de la montodoma ĉirkaŭaĵo, por konstruo de nova fonto kaj por plibonigo de la vojoj al la esperantista montodomo. Grupo da esperantistoj partoprenis en peniga laboro por elfoso de pinarboj, kiujn oni plantos ĉirkaŭ la montodomo.

Jen novaj kontribuoj:

Prof. Petâr Dinekov, Sofio	5 lv.
Lujbka Mladenova, Mongolio	5 „
Akad. Georgi Naĝakov, Sofio	4 „
Penko Penkov, Sofio	2 „
Nadejda Boeva, Sofio	2 „

La esperantistoj fervojistoj el Sofio decidis kolekti inter si monon por aĉeti la eksteran pordon de la montodomo. Ili jam kolektis 50 levojn. La membroj de la esperantista societo en u. Velingrad promesis helpi la konstruadon per sendo de 55 levojn. En pluraj lokoj en nia lando kaj en eksterlando oni kolektas monon konsciante, ke la tempo por finkonstruo de la montodomo alproksimiĝas kaj oni povas fari tion nur se ni havas monrimedojn.

Ni kore dankas al ĉiuj kiuj helpas per mono kaj laboro la konstruadon. Tamen estas ankoraŭ multe da esperantistoj inter kiuj elstaraj, kiuj ĝis nun pro objektivaj kaj subjektivaj kaŭzoj ne kontribuis al la konstruado. Ni esperas, ke ili volonte en plej proksima tempo faros tion. Antaŭdankon!

La Estraro de la Turista Sekcio
„Esperanto“

En revuo „**Jenata Dnes**“ — Sofio (numero 12 de decembro 1962) — en la fako „Nova jaro — novaj kreaĵoj planoj“, en la skizo „La ĉiutageco de Stefka Prohaskova“ interalie la aŭtorino P. Prokopova rakontas, ke la reĝisorino Prohaskova enscenigos la verkon de Ŝekspiro „Komedio de eraroj“ en Esperanto en la kadroj de II Internacia Arta Festivalo.

En ĵurnalo „**Borba**“ — Târnovo (de 31. I. 1963) — informo titolita „En kelkaj lingvoj“ kun bildo — respegulanta la eldonojn en germana, vjetnama, pola, hungara, bulgara lingvoj kaj en Esperanto de la libro de l'japana profesoro Tojuma „En Hiroŝima“. En bulgara lingvo ĝi aperis por unua fojo en kelkaj numeroj de ĵurnalo „Borba“, traduciĝita de Ĥr. Manolov el vil. Pol'ski Trâmbeŝ.

En ĵurnalo „**Rabotniĉesko Delo**“ — Sofio,

(de 10. II. 1963) — informo en la paĝo, dediĉita al scienco, literaturo, arto, ke Esperanto estas enkondukita en la Sofia ŝtata universitato. Kiel instruanto estas invitita la konata bulgara esperantisto A. D. Atanasov.

En ĵurnalo „**Rodopski minjor**“ — Madan (de 12. II. 1963) — en la artikolo „Fajrujo de amatoraj talentoj“ de Rozeta Janakieva, direktorino de la Domo de Kulturo en Madan, la aŭtorino interalie rakontas pri la kurso de Esperanto de la Domo, en kiu la esperantistoj perfektigas siajn lingvajn konojn por povi partopreni la 48-an Universalan Kongreson en Sofio.

En ĵurnalo „**Literaturni novini**“ — Sofio (de 13. II. 1963) — informo en rubriko „Novaj libroj“, ke aperis „Lernolibro de Esperanto“ de Iv. Sarafov kaj Sim. Hesapĉiev.

GRAVA INICIATIVO DE LA JUGOSLAVIAJ ESPERANTISTOJ

La jugoslavia Esperanto-Instituto (Beograd, Terzije 42) komencas eldoni multobligitajn (stencilitajn) „Kajeroj“-n en kies enhavo estos artikoloj, kiuj informos pri la laboro de la Instituto kaj krome havigos studojn prilingvajn, priliteraturajn, prihistoriajn (necesaj por sinpreparo por ekzamenoj), instruplanojn de instruado kaj de ekzamenoj materialojn necesajn por ekzamenoj, materiaĵojn utilajn por instruadoj de Esperanto ktp.

La entrepreno estas tre serioza iniciativo kaj prezentas intereson ankaŭ por la esperantistoj en aliaj landoj. Ni nur povas bedaŭri, ke la multego de la interesemaj bulgaraj esperantistoj ne povos havigi al si tiun ĉi valoran publikigaĵon — pro valutaj kaŭzoj. Ĉiu kajero havos prezon lau sia grandeco (amplekso); por aboni la „Kajerojn“ oni devas deponi 1 usonan dolaron; el la depaŝaĵo estos deprenata la kosto de ĉiu aperinta numero.

Ada

LETERO EL EKSTERLANDO

Ĥara amiko,

Dankon pro via salutletero. Nature mi estus skribinta multe pli frue al vi, se ne estis diversspecaj malhelpoj. Ĉefe pro miaj ege malfacilaj laborkondiĉoj kune kun mia malbona sans-tato . . . Miaj laborkondiĉoj nun efektive estas tiaj, ke mi devas tre streĉe labori por ke mi povu entute ekzisti. Kaj mia situacio estas nun tiel katastrofa, ke mi decidis tiri ĝin antaŭ la publiko en iu socialdemokrata gazeto. Ĉar post tiuj ĉiutagaj laŭdoj pri nia „demokratio, libereco kaj alta vivnivelo“ oni ne bezonas ĉion ajn toleri!! Mi ja publikigis proksimume 25 artikolojn pri sciencaj kaj teknikaj temoj kaj nun iu finegocisto, kiu estas unlike mokata de siaj kolegoj volas tute malhelpi al mi daŭrigi mian laboron. Feliĉe mi ne staras sola . . .

Mi petas vin bonvolu transdoni elkorajn salutojn al la bulgaraj esperantistoj! Salutu la klubanojn, ke nun, kiam mi vidas mian restadon en bansanatori „Bankia“, apud Sofio, iel en perspektivo, mi konvinkigis, ke restado tie estas multe pli bona por la nervoj ol ĉiuj tielnomitaj nervmedikamentoj, kiujn produktis la kapitalismaj landoj ĝis nun!!! Kaj la kapitalisma mondo certe neniam povos produkti tian nervmedikamenton!

Kaj nun Bonan 1963 Jaron al vi kun familio kaj al tuta bulgara popolo! Mi tre ŝatas kune kun mia edzino viziti la 48-an UK de Esperanto en Sofio.

La 1-an de januaro 1963
Stokholmo

Amike via: Nils



DEZIRAS KORESPONDI

BRAZILIO

Ivanilda Silva (11-jara knabino), Rua Augusto Vasconcelos, 120/301, Campo Grande, GB-Rio de Janeiro.

Carlos Augusto Barbosa (19-jara fraŭlo), Rua Catiaara, 66/casa 7, Campo Grande, GB-Rio de Janeiro.

Maria de Abreu (24-jara f-ino), Rua Gianerini, 25-Campo Grande, GB-Rio de Janeiro.

Wilson Antonio Batista (17-jara fraŭlo), Rua Oiticica, 30-Campo Grande, GB-Rio de Janeiro.

Milton Moraes Martins (19-jara fraŭlo), Rua Ivo Prado, 13-Campo Grande, GB-Rio de Janeiro.

Glaucenira Costa (14-jara knabino), Rua Prof. Felioe Santiago, 74-Campo Grande, GB-Rio de Janeiro.

Amarilio Carvalho (kursgvidanto de la junularo), Prŝkesto 4.081-Rio de Janeiro.

Aloisio Sartorato (18-jara fraŭlo), Poŝkesto 4081-Fundacao, Getúlio Vargas-Rio de Janeiro. S-ro Longino Goncalves Sebastiao (22-jara), Poŝkesto 9, Monte Alegre de Minas, MG.

F-ino Loraino Mendonea Vieira (15-jara), Av. Governador Valadares, 22, Monte Alegre de Minas, MG.

S-ro Edmilson de Vasconcelos, Rua Cel. Videla, s/n, Monte Alegre de Minas, MG.

S-ro Ronaldo Miranda, Rua Benjamin Constant, s/n, Monte Alegre de Minas, MG.

S-ro Alex Machado Knippel. Praca Dom Rduardo, 14, Monte Alegre de Minas, MG.

INDONEZIO

S-ro Mh. Tadin Asror (24-jara), Dk. Djetis n-ro 524, Ds. Gunungpring **Muntitan**, Mage-long, Dja-Tong — kun el; PI, PM, fotoj.

POLLANDO

D-ro A. Wenclewski, str. Wojshowa 13/3, Poznan — pri filatelio.

RUMANIO

Ștefan Mihai, str. Trojan 26, Bloc B 5, et II, ap. 16, Coustanta.

HUNGARIO

György Kisbalázs, Pécs Nagyrpad, 34-jara instruisto.

INDONEZIO

Lie San Sien. Djl: Dagen no: 56. Jogjakarta/java.

Lie A Eng. Djl: Kemetiran Lor no: 20. Jog jakarta/java.

Lie Ngo Koe. Djl: Dagen 56. Djokja/Djateng.

BULGARIO

G. V. Jordanov, podelenie 75-100-7, Kazanlák-pri sporto kaj kino.

Ivan Zahariev, Kazanlák, str. Tulovo 1, pri Esperanto, pedagogio, PM, PK, libroj ka.

Snejana Petrova, Iernantino, Kazanlák, str. Tolbuhin 64, pri Esperanto, PK ka.

120 gelnantoj (13—18 jaraj) deziras korespondi kun la tuta mondo. Adreso: Politeknika gimnazio, Polski Trámbeš, Tárnovsko.

Por la „Festo de l' amikeco“ (10.3.63) sendu salutleterojn tutmonde al: Esperanto-societo en Polski Trámbeš, Tárnovsko. Respondo garantata.

Zlatka Iv. Dobrev, str. „Raĉecki“ 37, Kazanlák, instruistino, PK kaj kartojn.

Nedka Boneva Ivanova, Kasanlák, str. „K. Veliĉkov 32, PK, portretojn de kinoartistoj kaj esperantistoj.

Pastro Ĥristo T. Popov, Kazanlák, str. „St. Oreškov 13-a pri kinoarto, muziko ka.

Marina At. Zaharieva, Iernantino 13-aĝa, Kazanlák, str. Javorov 14, PK, PM, portretojn de kinoartistoj.

Penka Duneva (23 jara), s. Malomir, Jambolski.

Lazurka Vâlčeva (14 jara), s. Malomir, Jambolski.

Dunjo Stojanov (19 jara), s. Malomir, Jambolski.

Ivan Velez (14 jara), s. Malomir, Jambolski.

Andon Dimitrov (14 jara), s. Malomir, Jambolski.

Ĉefredaktoro: Violin OLJANOV

Redakta komitato: Kiril DRAJEV, Atanas LAKOV, Canko MURGIN (vicĉefredaktoro)
Ivan SARAFOV, Simeon SIMEONOV.

Korektis: V. Petrova

Adreso de la redakcio:

Sofio, poŝkesto 66.

Tel 3-26-82

BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

liveras la jenajn librojn kaj gazetojn:

„Sub la jugo“ de Ivan Vazov (en Esperanto) 1,73 lv.

„La mondo havas internacian lingvon“
(en bulgara) 0,50 „

Statuto de Bulgara Esperantista Asocio 0,10 „

Membro-karto 0,10 „

Malnovaj jarkolektoj de „Bulgara Esperantisto“ **kun granda rabato**

La asocio abonigas al:

„El Popola Ĉinio“ (6 kajeroj) 1 „

Sumojn kaj mendojn sendu al: **Bulgara Esperantista Asocio“ p. k. 66, Sofio**
